



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,  
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 253

Majo, 2007

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto  
Stevens Norvell — Kompostisto  
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto  
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson  
329 Poplar Drive  
Dartmouth, Nova Scotia  
KANADO B2W 4K8  
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:  
Reni Porter

71 RidgeValley Road  
Halifax, Nova Scotia  
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

## KIE VI ESTAS, JOHN UMLAH?

Baldaŭ, kiam la printempa suno varmas kaj sekigas la teron, mi trovos min en la mezo de kampo kiu estis antaŭe parto de farmbieno — farmbieno delonge forlasita kaj rekovrita de vegetaĵoj.

Mi kaj aliuloj serĉos homon, kiun konas neniu el ni. Li nomiĝas, aŭ pli ĝuste nomiĝis, John Umlah.

Kie vi estas, John Umlah? Ni serĉas vin.

Permesu al mi klarigi pri tio, kiu estis John Umlah, kaj kial oni volas lin trovi. Mia historieto traktas interesan parton de nia loka historio.

La lando sudokcidente de Halifakso, ĉefurbo de la kanada provinco Nov-Skotio, estas plejparte rokoplana kaj arbaroriĉa. Tie troviĝas ankaŭ multaj dolĉakvaj lagoj, kiel Piceoholma Lago kaj Longa Lago. (Ni revenos al la signifo de ĉi tiuj lagoj.) Mi diru maltroigante, ke la lando ne estas la plej fruktodona en la mondo. Tamen, en la frua 19-a



jarcento kontraŭ parceloj de la lando kvitiĝis kelkaj pioniroj, kiuj senarbigis la landon por planti kaj rikolti ion, kio povus kreski, kaj por bredi bovinojn kaj aliajn farmbestojn. Ĉi tiuj terkulturistoj neniam riĉiĝis – la lando estas tro malriĉa – sed iliaj familioj tie restis dum generacioj.

Unu el la terkultistaj familioj estas la familio Umlah. En 1893 mortis la familiestro, John Umlah. Oni enterigis lin en familian terenon, sub kverkarbo. Sendube tiu estis unu el liaj plej ŝatataj lokoj. Oni starigis al lia eterna memoro tomboŝtonon. Oni ne indikis la tombolokon sur karto, kompreneble, ĉar estis familia tereno kaj la tuta familio bone konis kie trovi ĝin.

Dumtempe, kaj poste, la apuda urbo pligrandiĝis. Kreskanta urbo bezonas pli kaj pli da akvo. La Komisiono de Publikaj Servoj (KPS), kiu direktis la provizon de akvo al la urbo, elserĉis novajn akvofontojn. La KPS trovis novan akvofonton en la lando de arbaroj, rokoj kaj lagoj posedata de la Umlah-oj.

Verdire, la lagoj ĉirkaŭ la familiaj terenoj de la Umlah-oj neniam fariĝis la ĉefa akvofonto de Halifakso. Pli ĝuste, la KPS volis evoluigi ilin kiel vicrezervojn, se la ĉefa akvofonta sistemo malfunkcius aŭ, daŭre dum la dua mondmilito, sabotiĝus. La KPS volis protekti la tutan terenon de kie fluis akvo al Piceoholma Lago kaj al Longa Lago, do aĉetis pli kaj pli de la akvo-provizantaj terenoj. Se la proprietuloj ne volis vendi, la KPS havis la laŭleĝan potencon por preni ĝin.

En 1953, la KPS eksproprietigis la Umlah-ajn landojn, kontraŭvole de la Umlah-oj. Amare, la familianoj foriris kaj neniam revenis.

Estis kruela faraĵo de la sorto ke, ekde 1973, la KPS ne plu bezonis la Umlah-ajn landojn. Ĝi trovis pli bonan, pli grandan akvofonton nordokcidente de Halifakso, kaj ne havis pluan bezonon por la terenoj prenitaj antaŭ nur dudek jaroj. En 1984, la provinca registaro nomis la tutan regionon „Provinca Parko de Longa Lago.” Estis bona faraĵo, certe, sed ankaŭ nur simbola, ĉar la registaro havis nek monon nek planon por evoluigi la parkon. Do la parko restis preskaŭ neuzata kaj mem nekonata de la popolo.

Dum la duonjarcento kiu sekvis la foriron de la Umlah-oj, velkinta estis la memoro de la preciza loko de la tombo de John Umlah. Maljunuloj memoris la ekziston de la tombo, kaj ĝian proksimuman lokon. Sed kun la tempopaso, kun la glaciigo kaj degelo far la brutalaj kanadaj vintroj, kun la natura kreskado de la arbaro, ĉiuj signoj de la tombo de John Umlah malaperis. Kiam, en lastatempaj jaroj, oni serĉis la tombon, oni nenion trovis. Ŝajnas ke la tomboŝtono estas falinta kaj, oni supozas, kuŝas arbarplanke sub folioj kaj branĉoj.

Bonŝance ekzistas kelkaj homaj, kiuj kredas, ke la Provinca Parko de Longa Lago devus esti pli uzata kaj ĝuata, sed kompreneble en maniero kiu montras respekton al ĝia sovaĝeco kaj ankaŭ al ĝia historio. Grava parto de la parka historio estas la fakto, ke la parklandoj antaŭe estis loĝataj de homoj, kiuj tie vivis kaj laboris, amis

kaj mortis. Ni (ĉar mi estas unu el ili) kredas ke, inter aliaj aferoj, oni devas trovi, identigi kaj protekti la tombojn de la pioniroj.

Ni kredas, ke ni alproksimiĝas. Lastatempe ni ricevis manskribitan karton, kiun donis al ni maljunulo. Bedaŭrinde, li tro malsanis por marŝi dum tridek minutoj de la publika vojo al la Umlah-aj terenoj, sed li volas tutkore, ke ni trovu la tombon.

Do nun vi scias kial baldaŭ, kiam venos la printempa suno, mi trovos min en forlasita farmbiena kampo, ĉirkaŭrigardante, subspirpetante: „John Umlah, kie vi estas? Ni serĉas vin.”

— Graham Steele  
<grahamsteele.ca/gs\_main\_esperanto.html>

## UBUNTU

Ubuntu estas zulu vorto kiu signifas, ke la homaro estas tute interligita. Mark Shuttleworth kaj lia sudafrika kompanio, Canonical Ltd., kreis ĉi tiun facile uzeblan kaj fidindan programon el la bazo de antaŭa linuksa\* programo, Debian. Ubuntu nun havas Viki-on kaj komunumon por regi kaj evoluigi ĝin. Canonical opinias, ke ĝi gajnos profiton el tiu senpaga programo. Mi tute ne komprenas kiel, sed ili jam kaptis min pro la magia vorto „senpaga”. Dell, granda komputila kompanio, decidis komenci ĉi somere vendi personajn komputilojn kun Ubuntu enkroĉita.

Ubuntu 7.04 (jaro kaj monato) estas linuksa sistemo kiu havas esperantlingvan „vizaĝon”... plejparte. Ne ĉio estas tradukita ĝis nun. Dum la tajpado de ĉi tiu artikolo, mi rigardas la supron de la ekrano kaj vidas „mer Maj 02”. Bona afero, por vivi esperantlingve, kaj tion mi ŝatas fari. La esperanta vizaĝo de mia komputilo multe helpas.

Mia vortprocesilo estas la ankaŭ publike kodita OpenOffice (malferma laborejo). Tiu programaro enhavas esperantan vortaron kaj uzas la Ubuntu-an esperantlingvan klavaron. Kiam mi tajpas „mer”, la programo surkranigas „merkredo”-n kiel sugeston. Eble mi ne uzas tiun sugeston sed plaĉas al mi, ke mia komputilo babilas esperantlingve kun mi.

Google, la plej uzata serĉilo, jam dum la pasintaj du aŭ tri jaroj havas esperantan vizaĝ-eblecon. Do, oni povas pli kaj pli komputilumi esperantlingve.

„La estonteco jam estas ĉi tie, sed la distribuado estas malegala.” (anglalingve: „The future is already here, it is just unevenly distributed.”) – William Gibson.

La ĉefaj programoj, kiujn mi nun uzas kiuj bezonas Esperantigon, estas la krosilo Firefox kaj la retroŝta regilo Thunderbird. Ambaŭ havas multajn lingvojn, sed ne Esperanton.

Partoj de la komputila mondo (kibernetikejo?) iom post iom iĝos pli malfermaj, pli demokrataj, malpli usonaj, malpli anglalingvaj, kaj feliĉe pli esperantlingvaj. Per Vikipedio (la reta komunuma kunlaborejo), per retaj babilejoj, per blogoj, per retpoŝtoj, per paĝaroj kiel <eo.lernu.net>, perfekta landeto en kibernetikejo estas konstruebla. Mia perfekta kibernetik-landeto estos demokrata, malferma, malkomerca kaj... Esperanta.

— Reni

\* Redaktora noto: Linukso estas komputila reg-sistemo. Vindozo estas alia reg-sistemo.

## UNIVERSITATO DE KALIFORNIO STARIGAS OFICIALAJN KURSOJN PRI ESPERANTO

La Universitato de Kalifornio en San Diego anoncas la starigon de oficiale aprobitaj kursoj pri Esperanto. Tiuj kursoj okazos somere kaj estos malfermitaj al la tutmonda esperantistaro.

La Universitato de Kalifornio en San Diego, ankaŭ konata laŭ la anglalingva siglo UCSD (<http://www.ucsd.edu>), estas unu el la plej konataj kaj prestiĝaj universitatoj en Usono, kaj inter ĝiaj profesoroj troviĝas ok Nobel-premiitoj. Ĝi situas apud la pacifika marbordo en suda Kalifornio, proksime de la landlimo inter Usono kaj Meksiko.

La kursaro daŭrigos la tradicion de la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), okazinta dum 30 jaroj en San Francisco kaj dum la lastaj jaroj en Vermonto. Honore al tiu tradicio, la nova kursaro en San Diego ĉi-somere pritraktos interalie la verkaron de la lastatempe forpasinta aŭtoro William Auld, la unua instruisto en NASK en San Francisco. La instruista teamo en somero 2007 konsistos el Paul Gubbins, kiu gvidos la superan kurson, kaj Lee Miller, kiu gvidos kurson por progresantoj. Grant Goodall, profesoro en la universitato kaj direktoro de ties lingva fako, estos la kursaron.

La kursaro okazos ĉi-jare inter la 9a kaj la 27a de julio. La universitato bonvenigas ĉiujn interesiĝantojn al siaj someraj kursoj, sendepende de antaŭa universitata studo.

Por intervjuoj kaj pli ampleksaj informoj pri la oficialigo kaj starigo de la kursoj: Grant Goodall [goodall@ling.ucsd.edu](mailto:goodall@ling.ucsd.edu)

Por informoj pri registriĝo, stipendioj, ktp: Ellen Eddy [eddyellen@aol.com](mailto:eddyellen@aol.com)

Retejo de NASK: <http://esperanto.org/nask/>

